



**PILO-PRESS**

Internacia  
Informservo

N-ro 9/77 - 2 mar 1977  
Aperas ĉiusemajne

Jara abono

30,- GM

=====

**Eldonanto/Herausgeber:**

Ludwig Pöckel  
Postfach 2113 1  
D-85 Nürnberg  
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

Pri la laboro de la komitato "Esperanto en la lernejojn"  
Laŭ intervjuo en Svisa Kurtondservo

Sinjoro Claude Gacond en unu el la pasintaj elsendoj de Svisa Kurtondservo intervjuis la sekretarion de la svisa komitato "Esperanto en la lernejojn", s-ron Olivier Tzaut. Surbaze de tiu intervjuo ni prezentas al niaj legantoj la laboron kaj rezultojn de tiu interesa iniciato.

S-ro Tzaut diris: Ĉirkaŭ 1970 mi kreis kun kolegoj laborgrupon nomitan "Grupo Lernejo kaj Vivo", kiu inspiriĝis per la pedagogio de la fame konata franca pedagogo Frenet. Dum jaroj ni renkontiĝis regule en diversaj lernejoj por interŝanĝi spertojn, ideojn, pretigi instrumentaterialon ktp. Kaj el tiu grupo "Lernejo kaj Vivo" formiĝis fine la komitato de "Esperanto en la lernejojn".

La decido lanĉi ĝin estis prenita en novembro 1974 kaj la tuta afero komenciĝis fakte en februaro 1975. Tiam ni dissendis alvokon al plura centoj da personoj, ĉefe el la instruistaro kaj ĉefe en Romandio. Unue estis letero kiu prezentis la problemon de la internacia lingvo ĝenerale kaj la situacion ĉi-rilate en Svislando. Oni anoncis ke kiel provizora sekretario mi pretas informi en plej diversaj medioj kaj ke mi laboros en kunlaboro kun la Kultura Centro Esperantista en La Chaux-De-Fonds. Fine de la letero mi lanĉis alvokon por ke oni subtenu finance nian agadon. Tiun alvokon sekvis 45 personoj, ĉefe ĝeinstruistoj ne parolantaj Esperanton sed favoraj al Esperanto.

Pri la laborprogramo

La ĉefaj punktoj estas la jenaj:

- 1) Sistema informado de la instruistaro, instruistaro, politikaj instancoj, ĵurnalistoj;
- 2) Pretigi dozierojn;
- 3) Malfermi kursojn;
- 4) okazigi instruokperimentojn kies rezultoj estos science mezuritaj kaj diskonigi ĉi-lastajn;
- 5) Proponi instruplanon al instru-ministerioj.

Poste, en la sama cirkulero mi anoncis du kursojn de Esperanto proponitajn de la Centro por perfektigo de la instruistaro de la Kantono Berno. Tiu kurso okazonta en aprilo kaj oktobro 1975. Fine estis aliĝilo kiu tekstis jene: Mi subskribinta x devontigas min pagi po x Frankoj pomonate por helpi al la efektivigo de la kampanja programo.

Ĉu estis favoraj reagoj?

Jes! De 2 jaroj ni ricevis proksimume 25 000 svisajn frankojn, kiuj permesis efektiviĝi grandan laboron. Tamen ne pli ol 120 personoj helpis nin finance. La granda problemo estas komprenigi al la multnombraj personoj, kiuj aprobas niajn klopodojn, ke ilia simpatio estas grava por ni, ilia financa helpo multe pli utilis!

## Cu estis interesaj rezultoj?

Certe, la plej interesaj rezultoj estas, ke la vorto "Esperanto" pli kaj pli perdas sian strangecon en la ĝenerala publiko; multaj gazetoj volonte aperigas artikolojn pri la internacia lingvo. Kaj mi diras ion gravan (parenteze!): Mi tute ne opinias ke, por ke oni akceptu Esperanton kiel pontlingvon, oni devas ŝanĝi la nomon kaj neniam plu paroli pri Esperanto, vorto kiu laŭdire ridigas la homojn. Ne la vorto mem ridigas, sed la fakto ke la fenomeno Esperanto estas malbone konata de la ĝenerala publiko. Tuj kiam la publiko regule aŭdas aŭ legas la vorton, tiam ĝi perdas sian strangecon kaj sekve sian ridindecon.

Pro tio mi tute ne konsentas kun tiuj kiuj nur parolas pri planlingvo aŭ internacia lingvo, timante ke la vorto Esperanto forigus la publikon. Mi multe pli timas la mistrafan propagandon de multaj esperantistoj kaj la fakton ke tro da ili parolas la lingvon. Oni ĉiam memoru ke plej taŭga argumento ĉiam estas bona scipovo de la lingvo.

## Pri atingoj de la kampanjo

De 2 jaroj mi ofte, en kunlaboro kun Claude Piron, Ĝenevo, prezentis Esperanton al almenaŭ 1 500 ĝelernantoj el elementaj lernejoj, mezlernejoj kaj por-instruistaj lernejoj. Krome ni prezentis Esperanton al multaj gekolegoj okaze de kunvenoj. La reagoj estis ĝenerale bonegaj. Sed unu afero estas - ŝanĝi sian opinion rilate al la internacia lingvo kaj tute alia afero estas - eklerni la lingvon kaj helpi finance al ĝia disvastigo. Mi diras ke la sinteno rilate al Esperanto daŭre evoluas kaj tre pozitive.

Konklude mi diras ke la gazetaro, radio kaj televido havas pli kaj pli favoran sintenon. Sed estas grave diri, ke personaj kontaktoj kun ĵurnalistoj estas tre efikaj, sub unu kondiĉo tamen, ke oni havu kiel eble plej bonan dozieron pri la problemo. Ĵurnalistoj ja tute ne interesiĝas pri la kredo-konfeso; ili ŝatas firmajn dozierojn. Do pli bone nenion fari ol iri renkonti ĵurnalistojn kun nura kredo-konfeso, kun fantazia aserto kiel "en la mondo estas 16 milionoj da Esperanto-parolantoj..."

Je la fino de la intervjuo Olivier Tzaut sin montris ankaŭ kiel lerta kanzonisto kaj gitaristo. Li kantis en Esperanto meksikan kanzonon kun la titolo "Voĉo de gitaro mia".

\*\*\*\*\*

## Esperanto-Skisemajno

Werfenweng (pp) - Ĝuste unu monaton post la Internacia Fervoĵista Esperanto-Skisemajno (IFES) en Les Gets, Francio, denove esperantistaj fervoĵistoj invitis al komunaj vintroportaj plezuroj: jam tradicie en la surmonta sportgastejo Strussing (1544 m) proksime de Bischofshofen kvardeko da aŭstraj kaj germanaj esperantistoj aŭ Esperanto-amikoj kune pasigis belegan semajnon de skiado, kantado kaj distro (15 - 26 febr). Ne nur dum la lastaj tri karnavalaj tagoj sed ĝis la lasta minuto regis senbrida gajeco kaj malmulte da tempo nur restis por Esperantolernado. Tamen komenco estas farita. Valorajn pokalojn kaj libropremiojn donacitajn de ministroj kaj aliaj eminentuloj, la organizinto Johann Geroldinger, Linz, povis disdoni inter la gajnintoj de la skiadkonkursoj. Venontjare en februaro, tuj post la IFES, okazonta en Greinau, Germanio, denove atendos la Strussing-domo tiun gajan rondon. Ĉu lastfoje?  
-Ritt-

## Foira Renkontiĝo '77

Leipzig (pp) - Sabato, la 12-an de marto, je la 19,30 horo okazos Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo '77 en la "Klubo de la Intelligentularo Gottfried Wilhelm Leibniz" Leipzig, Elsterstr. 35. La renkontiĝo, organizita de Laborrondo Esperanto, Leipzig, staras sub la temo "Amikeco kun Sovetunio".

## Por la prospero de BONA ESPERO

Münster (pp) - Inter Terre des Hommes kaj Bona Espero ekzistas vig-laj kontaktoj, kelkaj administraj aferoj estas klarigotaj, la subte-mado certe baldaŭ okazos.

Intertempe la esperantistoj el diversaj lokoj de nia kaj aliaj landoj sendas al Bona Espero paketojn kun vestaĵoj, utilaj domtolaĵoj kaj -artikloj. Krome oni sendas monon pere de iliaj UEA-konto.

Ni skribis al Bona Espero, ke danko ne estas necesa; ni nur volas kontribui per niaj rimedoj al ilia laboro. La afranko en Brazilo es-tas multekosta; forsendi aerpoŝtleterojn estas jam lukso. Pro tio speciale ĝojigas nin letero el Bona Espero. Ekstrakte ni ĝin publi-gigas:

".....alvenis gastoj ankaŭ el Brazilio kaj kune kun la Bonesperanoj 7 landoj estas konstante reprezentataj en Bona Espero.

Ni kaj niaj najbaroj en radiuso de 10 km travivis ĝojan kristnask-feston danke al la multaj pakajoj, kiujn ni ricevis el Eŭropo, pre-cipe el Germanujo.....Dum Kristnasko ni disdonis 55 donacojn al niaj najbaroj kaj intensa trafikode.....ĉevaloj plenigis la vojnon de Bona Espero. Estas tre interesa la diferenco de valoroj: en Eŭropo, kiam oni vizitas personojn, oni informiĝas ĉu tie troviĝas parkejo por aŭtoj; ĉi tie, kiam ni vizitas najbaron, ni informiĝas, ĉu tie troviĝas.....bona pastejo por ĉevaloj!!!

Pri Terre des Hommes ni estas atendantaj la viziton de sinjorino el Golanja, kiu reprezentas instancon, kun kiu Terre des Hommes rilatas. Eble ŝi venos ĉi tien je la fino de januaro, sed ni devos kunpreni ŝin en Brazilio, por ke ŝi ne perdiĝu survoje.

Dum la lastaj tagoj, en la vana klopodo trapasi riveron sen ponto, nia kaduka traktoro denove paneis (la kluĉilo). Ni devos venigi la vic-pecon el Sao Paulo kaj ripari ĝin en la savano; tio daŭras eble pli ol unu monaton!

...Ni ĉiuj, danke al Dio, bonege fartas kaj tio estas preskaŭ nekre-debla; kun tiel multaj infanoj kiuj vivas en nia "danĝera" savano! Verdire tiuj estas la mirakloj de sana vivo en pura aero kaj kun simpla manĝaĵo...."

Tiu ĉi letero estu instigo por ni, pliintensigi niajn personajn kon-taktojn por la prospero de Bona Espero. Baldaŭ aperos la nova "Voĉo el Bona Espero", eldonita de gesinjoroj Kehlet.

Kiu volas ekscii detalojn pri Bona Espero kaj subteni tiun Esperanto-iniciaton en Brazilo, skribu al S-ino Ursula Schrapp, Schmittingheide 17 d, D-4400 Münster.

Esperanto-Rondo Münster

## Novaĵoj el Triesto

Triesto (pp) - Rezulte de Esperanto-kursoj okazigitaj pasintjare en ŝtata mezgrada lernejo "G.R. Carli" el Triesto, estis disdonitaj 11 diplomoj, el kiuj 8 unuagrada kaj 3 duagrada.

La simpla, sed instiga festeto okazis la 18-an de februaro 1977 en ĉeesto de s-ro Renato Bisi, triesta Esperanto-katedestro.

Por fortigi la propagandan kason, la Triesta Esperanto-Asocio eldo-nis plaĉan ŝlosilringon kun trikolora Esperanto-insigno, diametro 2,8 cm. Prezo 4,- GM. Interesuloj povas mendi ĝin ĉe Ludwig Pickel Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, liveribla post 2 semajnoj.

\*\*\*\*\*

Subtenu la Esperanto-laboron en la Tria Mondo!

## Reagoj - opinioj

Koran dankon pro via bonege redaktita Pilo-Press! En la nuna n-ro, kie aperis la favora mencio pri la prelego de s-ro Trixini en Yoblenz, mi legis ankaŭ ege interesan artikolon de nia s-ano A. Pettyn, pri la eventuala eldono de Eŭropa Esperanto-Radio-Revuo. La ideo estas bonega kaj mi persone ŝatus centprocente subteni per ĉiuj fortoj! Ĉiuj stacioj devus penadi laŭ ebleco la plej bonan programon prezenti al la aŭskultantoj, se ili scias, ke la teksto de la unuopaj plej interesaj programeroj aperus ankaŭ en Radio-Revuo! Nature en tiu ĉi okazo ili devus regule nutri vin jam anticipe per manuskriptoj, ĉar povas esti, ke la aŭskultado pro diversaj kaŭzoj ne estus ebla. Tiam la legantoj jam el pura scivolemo provus kapti la diversajn staciojn kaj konvinkigi pri la bela elparolo, bona stilo kaj interesa enhavo de la unuopaj stacioj.

Povus ekesti vera konkurso inter la diversaj E-sendantaj stacioj por fariĝi la plej bona el ĉiuj vidpunktoj! La aŭskultantoj povus esprimi sian opinion ankaŭ sur la paĝoj de la radiorevuo kaj tiamaniere vigligus la tuta radio-aŭskultado, sed certe estas utile ankaŭ por vi, se vi entreprenus tiun ĉi revuon eldoni.....

Dr. J. Kondor, Neuwied, FRG

De tempo al tempo prezentas sin en Esperantujo, ne ofte, humoristo. Konsidere al tiu fakto la ĵus eldonita "Bervalo Kuriero" estas bonveninda lekturo ĉar nur seriozaj aferoj preskaŭ elsekigas la leganton. Rememorante nian neforgeseblan humoriston, majstran vortludiston Raymond Schwarz, ni ankaŭ ĝoju pri nia bervalo talento (ankaŭ verbala) Louis Beaucaire.

Bertil Englund, Hof, FRG

Kara redaktoro Ludwig Pickel. Mi tre kore dankas vin por la regulaj sendaĵoj kun "Pilo-Press" kaj aliaj. Mi ofte utiligis la informojn en nia Esperanto-rubriko "Esperanto-Novaĵoj" en nia regiona gazeto "Gazeta Olsztyńska". Mi estos tre deviga, se vi sendos al mi ĉiujn viajn tre interesajn eldonaĵojn....

Redaktoro Zdzisłavo Jałowiecki,  
Olsztyn, Pollando

Agrablege surprizis min la ricevo de Bervalo KURIERO. Mi admiras vian fervoran apostoladon por la bervalo doktrino, sed via laŭdo de mia modesta verko iom konfuzas min.

Via KURIERO certe helpos forblovi la polvon de nia Movado, kaj, se iam aperos dua numero, mi volonte sendos al vi originalajn, "virgajn" bervaloĵojn aŭ aliajn frivolajn kontribuaĵojn.

Sed, kiel modelaj epikuranoj, ni vivu hodiaŭ kaj ni bone uzu vian unuan numeron.....

L. Beaucaire, Berlin

## Esperanto en Radio

Laŭ statistiko, publikigita en la germanlingva informservo END, en F R Germanio esperantisto nun povas aŭskulti al Esperanto-elsendoj semajne dum 13 horoj. Sole dum dimanĉoj oni povas aŭdi Esperanto-programojn dum 135 minutoj. Je la pinto de la semajna elsendotempo staras Varsovio kun 575 minutoj. Pri tiu fakto Süddeutsche Zeitung, en sia eldono de la 21-a de februaro, publikigis informon, cititan el END, sur la televidaradia paĝo. Cetere, atingis min kelkaj gazet-eltranĉaĵoj, kies informoj kaj artikoloj okupas sin pri "Esperanto en la radio". Montriĝas ke la praktika uzo de Esperanto en la radia medio trovas la atenton de ĵurnalistoj.